

# **LA RACIA KAJ ATEISTA BUDHISMO**

Adaptita kaj tradukita  
el la franca lingvo  
fare de **T.F.**

**Amika Esperanto-Rondo/ Laŭte!**  
FR 47470 Beauville  
1996

## ENKONDUKO

La fama hinda psikisto Kriŝnamurti kutime diris, ke **"la revolucio devas komenciĝi per interna, psika transformiĝo de la individuo"**. Pri tio certe konsentus ĉiu ajn budhano. Kion do tiu tre malnova hindadevena doktrino, la budhismo, povus nuntempe alporti al ni ? Jen studeto verkita de eŭropa instruisto, koncizigita kaj senŝanĝe tradukita, por tio, ke oni juĝu rekte plejeble objektivite pri ĝia intereso. La oftan tiean renkontadon de sanskritaj vortoj ne tro timu la leganto : tiu "teknika" flanko estis necesajo, ĉar traduko el sanskrito estas delikata precizotaska afero. Cetere, tiuj vortoj estas entekste pli grasaj, kaj kunigitaj en fina glosaro. Tamen estas espereble, ke tiu broŝuro ne aspektos tro didaktika...

Temas ĉi tie pri racia (sed neracionalisma) budhismo, same kiel ĝi estis en sia ekdisvastiĝo ; en tiu ĉi verkaĵeto, sen azioinfluaĵ postsignoj, adaptita al la eŭropa nuna pensokapablo. Tiu tute "negativa vojo", krom profunda filozofio, ankaŭ estas praktika instrumento (kaj en tiun direkton ni precipe traktis ĝin), memelliberiga, liberiganta el malkono, el praimpulsoj, el ĉia psikokateno. La realan liberon havigos al ni nek politikistoj nek pensistoj nek doktrinuloj nek iaj ajn mastroj. Sed ni mem provu atingi ĝin.

La tradukinto

Ĉiujn tie uzitajn vortojn enhavas la Plena Vortaro kun Suplemento (naŭa eldono). La neesp-aj terminoj estas enfine arigitaj.

+++++

### PRONONCO de la SANSKRITAJ VORTOJ

"y" estas prononcenda kiel l' esp-a "j"  
"R" kiel "ri" (proksimume)  
"c" kiel "ĉ"  
"j" kiel "ĝ"  
"jñ" kiel "gnj"  
"ç" kiel "ŝ" (fakte kiel la germana "ch" en "ich")  
"M" nazaligas la antaŭan vokalon : "aM" estas pron. kiel la franca "an"  
"â", "î", "û" prononcendaj kun duobla daŭrigo  
"H" kaj "N" proks. kiel la esp-aj "h" kaj "n"

+++++

### ADRESOJ

Centre d'Enseignement de la Méditation (C.E.M.),  
2, avenue des Bouleaux, F-77220 GRETZ (Francio)

Budhana Ligo Esperantista, PF 1323,  
D-7292 BAIERSBRONN I (F. R. Germanio)

## PRI RACIECO

Precipe al "raciuloj" ni intencas proponi aŭtentikan studon. Kio do estas komprenenda per tiu termino? Laŭ ni, "raciuleco" rilatas kun nura funkciado de la neocerebeo, tiu propre homa cerbo, kiu, en diversaj gradoj, estas pli-malpli influita, kelkfoje eĉ forkovrita, de la du ceteraj pli malnovaj cerebeloj, la paleo- kaj la arkeocerebeloj.

Se oni konsideras la bezonon de absoluto, funkcion de la homeca **manas** (menso), oni konstatas, ke la respondaj rimedoj dependas aŭ de raciaj ebloj aŭ de neraciaj impulsoj. Tiel la raciega aspekto de la budhismo (kontraŭvole ni tiel nomas la budhan darmon) ofte jam estis preskaŭ tute forkovrita de iaj neraciaj superregantaj influoj.

La racia aspekto karakteriziĝas per la "gnozo", la Kono ; la neracia aspekto per kredoj, per fido. Legante "**Kâlâmasutta**" kaj aliajn gnozemiajn tekstojn, oni povas aserti, ke ne ekzistas alia tiel raciopotencema ismo krom budhismo.

Pri racieco kaj neracieco, ni konsideru ekzemple fulmotondron. La fulmo ekfrapas ion proksime. Ekbrilas fulmolumo. Post kelkaj sekundoj tondregas. Precize tiam, kiam ĉiu danĝero estas malaperinta, iuj ektimas, eĉ ekestiĝas teruroplenaj, kvazaŭ iliaj vivoj estus endanĝerigitaj. Tio estas bona ekzemplo pri neracieco ! La tondro estigis reaperon de la impulsoj, de "**bhavâsrava**" (vivovolo). Jen kiel racia menso funkcias : "fulmis, tondras, foriĝis la danĝero !", ĉar la neocerebelo konas la fulmo-fenomenon, kaj sur la psiko plu ne efikas la tondro.

Grandnombregaj estas la ekzemploj pri kovriĝo dela racio fare de la impulsoj, nomitaj de la darmo "**âsrava**", pusaĵoj, venenaĵoj, impulsoj de dezirovolo, vivovolo kaj malvidovolo (rilate fenomenan malkontentigecon).

Kio estas la pure racia sintenado ? Ekzameni la fenomenojn kaj vidi ilin kiel nurajn sentumimpres-

ojn (notu, ke ankaŭ la menso estas sentumo, laŭ budhismo). Neracia sintenado konsistas en tio, ke oni opinias esti mem envolvata en tiuj fenomenoj, kaj atribuas ian realecon al ili, interidentigante la spektanton kaj la spektaklon. Sur tiu misa realaĵo, impulsoj ekkonstruos kompensosistemon, se ne, ekaperos angoro.

Se li konsentas tiun ĉi mensan funkcion de la **manas**, kiu antaŭsentigas lin pri transo de la fenomenoj, raciulo kapablos koncepti senfenomenan absoluton, pere de transracia funkcio, transcenda kono : **prajñā**. Li komprenos, ke fenomenoj, eĉ kiel ajn subtilaj, estas sendaŭrecaj, senesencaj, malkontentigeccaj, kaj, per ekzercado, li povos aliri "sennaskecon, senfariĝecon, senkreecon, senkondiĉecon", en estingo, en blovestingiĝo (**nirvāNa**) de la ekzistokonsistigaĵoj. Estingiĝas la spektanto, kaj do la spektaklo.

La neraciulo, submetita de impulsoj, de arkeocerebelaj kaj paleocerebelaj "memoroj", kiam ekestas en li la bezono de absoluto, nur povas aliri "hipostazojn" : diojn, diaĵojn, panteonojn, hierarkiojn, klerikarojn, ceremoniojn, kultojn, adorojn, submetiĝon al iu Majstro ktp., pere de kredoj, fidoj, imagaĵoj. Tiel kompensiĝos lia bezono de gepatroj, protektantoj, kreantoj, kiuj dum momento kvietigos lian angoron. Se lia neracieco malebligas la ekeston de **prajñā**, li realportigos sian esperon al sistemoj certigantaj ontan sekuron, la savon !

Homoj estas klasifikeblaj laŭ la intenseco de siaj impulsoj, gravega nocio por "enirokvalifiko" en la budhismon. Unue, la "nenormale nenormalulo", kiu ne kapablas superregi siajn impulsojn (en la plej alta grado troviĝas ulo kapablanta mortigon aŭ seksperforton), kiu ne kapablas ekzerciĝi ("meditadi") pro bildoj, imagoj, eĉ halucinacioj, aŭ nekapablanta atenton pro pensovagado. Poste, estas la "normale nenormalulo", kiu kapablas sekvi la budhisman vojon, kvankam lin ankoraŭ submetas impulsoj, ĉar li kapablas regi ilin. Fine, la "normale normalulo", kiu elsekigis la impulsofonton, la **arhat**, kies neocerebelo funkcias sen interveno de la

arkeocerebelo, kaj kies aktivado ĉesiĝas momente en **nirodha**, kaj finfine en **parinirvâNa**, per **estingiĝo** de la "renaskiĝokonscio".

## DETERMINISMO KAJ LIBERO

La karakterizo de ĉiuj fenomenoj, de la plej krudaj ĝis la plej subtilaj, estas ilia tuta determinismo: efikoj el kaŭzaroj, neŭtralaj en si mem, ĉiam ŝanĝiĝantaj, senesencaj. Pro la blindo de la psiko, kiu projekcias (imagekonceptas) "memon" kun soifo de realeco, de daŭreco, oni juĝas, ke la fenomenoj estas agrablaj, kiam ili konfirmas tiun iluzion memon, malagrablaj, kiam ili malkonfirmas ĝin. Tiu misrealaĵo, la memo, estas trompilo kaŭzata de la memoro, kiu kreas iluzion de "tempo", nur fikcia kaj neperceptebla. "Vidi la objektojn tiaj, kiaj ili estas", **vipaĉyanâ**, egalas neniigi la psikajn faktorojn de **avidyâ**, de blindigo, kiuj kondukas al malfeliĉo, kiel klare asertas la "ĉeno de interdependaj originoj" (vidu poste).

Ni konscias pri tio, kion ŝokan, ĉagrenan, eĉ malesperigan enhavas tiu teorio de tuta determinismo kontraŭ "malfortaj animoj", kiuj "kredas" liberan arbitron, volon, fenomenokreon fare de superpotenca kreanto, al kiu oni preĝas, kaj kiu respondas (li estas fenomeneca!). La transfenomeneco, la tuta malpleneco, **ĉûnyatâ**, neniel rilatas kun ia "principo", ia "Bramao". Cetere, laŭ budhistaj skribaĵoj, la "Bramao" eraras kun sia kreantoiluzio.

Estas tre kurioze konsideri tiun bezonon de libera arbitro, kiu probable rilatas kun nostalgio al transfenomeneco. Kiel do homoj tute ĉirkaŭigitaj de sia korpo kaj de sia psiko povus trovi en tiuj katenoj ian "liberon" ? Vana traserĉo de tiuj, kiuj ne komprenas, ke la libero troviĝas nur per katenorompo. Tial la budhismo, kaj precipe ĝia gnozema esprimo, estas elitema. Nur "fortaj animoj", ne bezonante protektanton, povas aliri ĝin.

## HIPOTEZOJ

Estante tolerema, la budhismo permesis penetron en sin de iaj filozofiaj aspektoj, de kutimoj de la landoj, en kiuj ĝi estis instruata, kondiĉe ke tio ne kontraŭu ĝiajn fundamentajn tezojn.

Ni intencas prezenti formulaĵon de la aŭtentika kerno de la darmo, sen ornamaĵetoj, sen "hipostazoj", sen folkloraj aŭ rasaj almetitaĵoj. Tiu formulaĵo nepre karakteriziĝos per tio, ke ĝi devenas de skribaĵoj kaj estas lernigata de instruantoj.

Se do oni konsentas pri nepraj bazoj : nekredemo, fenomenata malkontentigo, nepra kaŭzeco, oni povas formuli unuapasaĵajn hipotezojn :

- hipotezo de transfenomeneco, absoluto ;
- hipotezo de iluzia memo ;
- hipotezo de la tri konsistigaj homaj modalecoj: modalo fiziologia (**rûpa**), psikologia (**nâma**), kaj modalo de metafizika "efiko" (**prajñâ**) ;
- hipotezo de renaskiĝoj (malpli grava ol la ceteraj, ĉar oni povas konsideri liberiĝon "tie ĉi kaj nun");
- konsekvence, hipotezo de la karmo, pri agoj kaj iliaj rezultatoj.

Se tiuj bazoj kaj hipotezoj estas konsentitaj, ebligis eniri la propran budhisman vojon, poste difinitan teknike, kaj atingi partan aŭ tutan liberiĝon.

## STRUKTURO DE LA DARMO

### 1) La kvar "noblaj veraĵoj"

Jen la fundamento de la darmo, kion oni celu kompreni ne nur dialektike (mense) sed ankaŭ per transcenda Kono, per **prajñâ**.

Unua veraĵo (duĤkha-satya). Ni tradukis "satya" per "veraĵo", kiel oni kutimadas. Preferinde estus "esencaĵo", ĉar -AS- (esti) estas la sanskrita radiko de "satya", kiu do signifas "stantaĵon, evidentataĵon, verecaĵon".

Tiu unua veraĵo temas pri la fenomenata malkontentigo (**duĤkha**). Ĉiu fenomeno, pro siaj kondiĉataj ekzistataĵecaj (do ne memrealecaj, nedaŭrecaj)

karakteroj, estas al la iluzia memo fonto de malkontentigo, de la plej eta grado de malsaneto ĝis la plej kruele kaj de la psiko.

Dua veraĵo (samudaya-satya). La dua veraĵo, veraĵo pri la origino de la sufero, tiel tekstas : "temas pri tiu renaskiganta soifo, ligita kun la sentuma deziro kaj la avido kiu, tie ĉi kaj tie for, ĉiam trovas novajn ĝuaĵojn".

Tiun brulantan soifon, **trĤNĤ** (pron. **triĤnĤ**), ni ofte renkontos en tiu ĉi studo. Ĝi enhavas tri aspektojn : 1. soifo sentumi per la ses sentumoj (la menso estas la sesa) : dezirovolvo ; 2. soifo "iĝi", ekzisti: vivovolvo ; 3. soifo ne ekzisti, kondukanta al sinmortigo, tre malbona solvo, kiu ne haltigas la ekziston. Tiuj soifoj efikas kaj sur la konscio kaj sur la nekonscio.

Se oni malfacile konsentas la hipotezon de renaskiĝoj, oni konsideru, ke ĉiumomente okazas memrenaskiĝo, kaj, ke la sekvon de la ekzistostatoj dum la vivo-daurado certigas la iĝosoifo, la vivovolvo.

Tria veraĵo (nirodha-satya). Veraĵo pri neniigo kaj ĉeso de la sufero. "Tiu ĉeso estas tuta malaperiĝo de la soifo, estingo de la soifo. Tio estas forlasi ĝin, liberiĝi kaj malligiĝi de ĝi."

Kvara veraĵo (mĤrga-satya). Ĝi indikas la "vojon", t.e. la ekzercadon por atingi tiun ĉeson. Ĝi difinas la tre konatan "okeran vojon", kiu detale poste estos pristudata.

## 2) Vojo al transcendeo, vekigo

Ni vidis, ke la kvara veraĵo indikas la vojon por aliri transcedecon. Sed tuj necesas, kun la antaŭa klarigo pri determinismo kaj libero, aldoni iujn avertojn.

Ĉiu formuleblaĵo estas nur relativa veraĵo (**saMvritti satya**). Oni ne eraru, konsiderante tiujn propoziciojn kiel vojon al la absoluto, kio estus dialektike absurda! Por eksteriĝi el kondiĉoj, oni ne bezonas kondiĉojn, sed ekzistas preferindaj kondiĉoj. "Vojo, kiu estus vojo, ne estas vojo. Por tio, ke vojo estu vojo, nepras ke ĝi estu nevojo. Kaj sur tiu vojo paŝas



neniu", diris fama ekzegezisto de la dekkvina budha jarcento.

Aliel dirite, oni ĉiam devas memori la du flankojn de la fenomenoj : "malplenecon" (pli bone estus "vezikecon") kaj "tielecon". Tio estas : senmem-realecon" kaj "econ esti tiele", **ĉūnyatā** kaj **tathâtā**.

El ambaŭ nocioj fontos prava komprenado de la vojo : al la ekzercado de ĝiaj faktoroj almetiĝos la konstanta rememorigo pri la senrealeco de tiuj faktoroj kaj de tiu, kiu provas apliki ilin.

Kio precize okazos post iu prepariĝado - kiu eble povas esti daŭra -, post aplikado de la teknikoj? Simile kiel songanto (dum lia dormo la songo estas reala, li ne dubas pri ĝia realeco) vekiĝas kaj tiam konas la songon kiel nerealaĵon, tiel tiu, kiu paŝas al la transcendeco, vekiĝas al prava vido pri la aĵoj, kaj agnoskas tion, ke lia antaŭa kono estis iluzia. Tiu procezo estas subita, sed ĝi estas preparita per progresinta ekzercado. Evidente ĝi estas transe de ia ajn difino, ĉar ĝi estas finiĝonta en transdialektika nekconceptebla transcendeco. Ne povante esprimi tion, kio la vekiĝinto estas, tamen ni provu konigi tion, kio li ne estas. Tiucele, ni reprenu la difinon de la tri specoj de homoj. Unue la nescianto, kiu "nescias, ke li ne scias". Laŭ lia vidpunkto, fenomenoj estas realaj, sen ia dubo ; lia "memo" estas sendependa, disigita de la aliaj, kio neprigas pozitivajn konfliktojn (dezirojn) kaj negativajn konfliktojn (malamojn). Lia menso estas "kovrita" per malklaraj pensaĵoj, kiuj senĉese impetas en lian animon (kion li ofte juĝas eterna!) ; konsciaj mensaĵoj, nekonsciaj impulsoj, superkonscia dormado. Ni nomos lin "individuo", "unuopulo", t.e. "nedividito", iluzie "unuiĝinto".

Homo de la dua speco estas tiu, kiu "scias, ke li ne scias". Li perceptis, eĉ kiomete ajn, la nerealecon, la vanecon de tiu iluzia memo. Li povas aliri "enmondan transkonon" (**lokika prajñā**) ; li pli ĝuste vidos la aĵojn, sed ankoraŭ ne laŭ "ekstrema transkono" ; li restos viktimo de la iluzioj de la "Ordo rerum" (ordo de la fenomenoj), t.e.

de la nekonsciaj impulsoj de la dezirovolo, de la vivovolo, de la malvidovolo. La "Ordo rerum", pozitiva kaj negativa, konstruo kaj detruo (ĉar la sumo estas nulo), estas partie pozitiva. Tial li havos edzinon, gefilojn, profesion, bienojn ; li zorgos pri ilia sekureco, sciante, ke lia amo al edzino, gefiloj, estas nur reto de la Ordo rerum, same koncerne la ĝuadojn. Tiel li ne maltrankviliĝas pro morto, kvankam li protektas la sanon, pro ruino, kvankam li laŭeble mastrumas la familiajn bienojn. Alidirite, li estas "travidebla" en la Ordo rerum, aĵoj fariĝas tra li, "kiel ĉarpenaĵo de la inicita ĉarpentisto". Tial ni nomas lin "persono", etimologie "per-sona" (tra-son-ulo), (aktora) masko, indiferenta, lokita sur la individuaj manifestaĵoj. En tiu "persono", la enmonda transkono vekigis, prilumante la menson, la superkonscion.

Fine, la homo de la tria speco, la vekiginto, kiu eksteriĝis el la sonĝo kaj estingis ĉian brulon, eĉ persono ne estas. Tiu "neniulo", alirinte "ekstreman transkonon", transmondan (**lokottara prajñā**), estas trans la fenomenoj. Ankoraŭ pludaŭros liaj ekzistokonsistigaĵoj ĝis lia morto, ĉar, kvankam el ili la iĝfaktoroj ne estas plu nutrataj, la rezulto de la intaj **saMskāra** (iĝfaktoroj) ankoraŭ restas.

Tiu neniulo scias, ke la soifoj estas estingitaj, kaj en la konscio kaj en la nekonscio. Ĉe morto, li komplete estingiĝas, sen resto.

### 3) Elementoj

Post la bazoj kaj la strukturo de la darmo, necesas studi iujn konendajn faktorojn ; sed ni malgraŭe avertas, ke oni ne povas elturniĝi sen instruisto kaj nepre memekzercado.

#### A) La okera Vojo

Enhavita de la aro de la "37 helpiloj al vekigo" (aro, kiun ni ne detalos), ĝi konsistas el ok artikoloj.

- Prava Vido ("prava" tradukas **samyak**, kompleta, perfekta, ktp).

Tiu ĉi vojo estas "helicoforma" : por eniri ĝin, necesas, ke oni havu jam eĉ iomete pravajn vidojn kaj opiniojn (t.e. konsenti la kvar "noblajn veraĵojn").

Per funkcia etiko, per ekzercado (neĝuste nomita meditado) de psikaj-korpaj teknikoj, kiuj transformas la korpon kaj la psikon per jen iompostioma jen subita procezo, la pravaj vidoj iĝas pli profundaj, efikas sur la nekonscio, kondukas al nova spiralerio, kaj tiel plue ĝis la nedifineblo, la kompleta vekigo, transiro al transfenomeneco.

Ni rediru, ke tiujn pravajn vidojn oni ne devas koncepti laŭ strikta senco : ekzistas la prava vido, sed neniu vidas ; ekzistas vojo, sed neniu paŝas sur ĝi. Formulaĵo estas relativa veraĵo, dum la transkono estas absoluta veraĵo (**paramârtha satya**), nedirebla, sed ĝi skizas relativan veraĵon. La absoluta veraĵo estas tute neformulebla, same kiel la unua ŝanĝo en la komplete blindigita "individo" : kiel do tiu, kiu "nescias, ke li ne scias", povas iĝi tiu, kiu "scias, ke li ne scias" ? Tio estas mense nekomprenebla. Simile estas neformulebla la "komencigo de la vagado", la ekiluziigo, la ekeko de la malvera memo, la iela "tempokomencigo" (ĉar la tempo mem estas iluzio), la iela "forlaso" de la absoluto kun ekestigo de iluziaj individuaj, iluzioplennaj, ĉiam nutrantaj siajn iluziojn, suferantaj kaj angorantaj.

"Nepravaj vidoj" refutitaj de la darmo estas inter aliaj : la materialismo, kiu neas la trian homan modalon, metafizikan, transindividan ; la senrezultigo de la agoj, opinio, kiu asertas, ke neniun rezulton kaŭzas agoj faritaj de nevekiĝintoj ; la senmorteco de la animo, de la psiko, ĉar, simile pri la korpo, mortonta estas la animo ; la kredo je individua aŭ persona dio, kreinta kaj reganta la aĵojn, senmorta. Al naivulo diranta : "nu, sed Dio kreis la mondon!", respondis saĝulo Nisargadatta : "vi mem per via menso estas kreanta Dion".

Ĝenerale, ĉiu kredo estas neprava veraĵo, malhelpanta la liberiĝon. Eĉ se oni farus "za zen" sen ĉeso dum jarcentoj, neprava vido ne ekestigus **prajñâ**.

- Prava intenco

Per "intenco" estas tradukita **saMkalpa**, decidemo, mensdecido, firma volo. Temas pri la intenco

paŝadi la vojon, ligita kun la prava vido (ambaŭ konsistigas la transkonon).

- Prava parolado

Tio estas senmensoga, seninsulta kaj utila parolado. Malprava parolado kaŭzas pentosenton, suferon, kaj misuzigas energion.

- Prava agado

Tio estas : ne vundi (intence) estaĵojn, ne ŝteli, provi sin teni prave kontraŭ la sentumaj deziroj (**kâma**).

- Pravaj vivtenadaj rimedoj

Ili forigas ĉiujn vivomanierojn maldomaĝantajn la estaĵojn : toks-, armil-, alkoholaĵ-komercojn, ekspluatadon aŭ komercojn je homoj, ktp.

Tiuj tri antaŭaj artikoloj konsistigas la budhisman neperforteman etikon (**çîla**), laŭcelan, ne konvencian, ne socialan. Ĝi estas nur provizora agomaniero, simila al horizonto ĉiam retiriĝanta dum oni antaŭenpaŝas. Ju pli kreskas la transkono, des malpli gravas la aplikado de la etiko, kies valoro plu ne ekzistas por la tute liberiĝinta sensoifa senkarma **arhat**. La etiko helpas al la ekzercado, kaj ankaŭ kulturigas la atentemon (**smRti**) per observado de propraj agoj kaj pensoj.

- Prava strebado

Temas pri strebado eviti aŭ venki la malfavoraĵojn, estigi aŭ persistigi la favoraĵojn. "Favora" aŭ "malfavora" (**kuçala**, **akuçala**) kvalifas kondiĉojn, farojn aŭ psikaĵojn favorajn aŭ malfavorajn al la ekzercado.

- Prava atentemo

La atentemo, **smRti** (pron. **smriti**), estas plej grava elemento de la ekzercado. Ĉiama devus esti la atentemo en ĉiu faro, por tio, ke la korpo kaj la psiko ne estu distriĝemaj, "sorbitaj" de la sentumaĵoj, de la ideoj, de la mensa filmo, kiu rapidege saltepasas el bildoj ĝis bildoj, al malvera ĉarmo aŭ imaga angoro. La atentemo celas eviti la kaptilojn de la "memo" konstruata de la impulsoj ; iom post iom la menso estas regita, la animo iĝas "kunmetita" (unuiginta), serena, atenta, scianta sin kontingenta; forŝvebas la fantasmagorio (**mâyâ**), konebla estas

la transfenomeneco. Tiu atentemo devas esti aplikata al la tri konscioniveloj : al la subkonscio per kontrolo de la psikaj inklioj (**anuçaya**), al la konscio per kontrolo de la sentumaj impresoj, al la superkonscio per rememoro pri la alabsoluta traserçô.

- Prava (mensa) koncentriço

Temas pri "centripeta" unuiço de la psiko, **samâdhi**, ĝia "fiksiço en unu punkto".

Tiuj tri lastaj artikoloj konsistigas **samâdhi** (tie ĉi : "sintezon", "kunmetadon") kiel korpan-psikan trejnadon.

B) La ĉeno de interdependaj originoj

Tiu kaŭza ĉeno, la kerno de la darmo, bedaŭrinde estas ne tre konata. Ĝi indikas la evoluadon de la "katastrofo", la sinsekvon de ĝiaj stadioj. La kaŭzeco, kiu interligas la ĉenerojn, ne estas rekta unudirekta simpla kaŭzligilaro : tiu ĉi prikaŭza nocio cetere ne ekzistas en la budhismo, kies analizado estas tre subtila, pli subtila ol ajna plejsubtila okcidenta sistemo. Ĉiu ĉenero kondiças, antaŭas, perante pririlatas al si alian ĉeneron. Temas pri interdependaj kaŭzaroj, el kiuj neniu estiĝo fontas el ununura kaŭzo.

La homa kondiĉo dependas de dek du sin reciproke intervariigantaj samtempaj faktoroj, kiujn ni tuj detalos jene.

a) "Depende de la malvido (**avidyâ**) estiĝas la iĝfaktoroj (**saMskâra**)"

La unua kondiĉo, radiko de la ceteraj, estas la nescio, la malvido kuŝanta en la konsciaj kaj nekonsciaj psikoniveloj, la radikala malkono pri la vera naturo de la fenomenoj. Ĉiuj fenomenoj : la materi-aĵoj, la korpo, la psiko, la emocioj, la konscio kaj la konsciostatoj (eĉ la subtilegaj **dhyâna**), enhavas en si neniun senŝanĝan principon, kiu "subtenus" kaj daŭrigus ilin. Ili ankaŭ estas sennem-realecaj, do malkontentigaj. La fundamenta eraro konsistas en tio, ke oni juĝas daŭra la nedaŭrecon, reala la nerealon, kontentiga la malkontentigon.

Pro tiu malkono kaj la intaj **saMskâra**, la kuniluzia homo, agante ekzemple perforte aŭ malame, ktp., (vole aŭ nevole, sed konscie), ekestigas novajn pliajn **saMskâra**, kiuj restigos lin en la iluzio, la malvido.

Se oni konsentas la renaskiĝisman hipotezon (kiu ne estas nepre enda, ĉar ĝi ne ludas rolon en la darma ĝiscela paŝado), oni aliel kompletigos la komentarion : pro la nescio (kaj ignoro!) pri la realo, iuj konsciaj agoj estigis karmajn postsignojn, konsciajn aŭ ne, kies tutaĵo, la karmo, estos unu el interdependaj kaŭzoj de postmorta konscio, kiu animos fekundigitan ovulon por homa renaskiĝo. Tiu nova ekzisto, tiu nova estaĵo, estos "nek la mema, nek iu alia" estaĵo : ĝi eliĝas el la ĵus estingiĝinta ekzistaĵo, sed estas malsama. Daŭros sinsekvo, ĉies ero kuntrenos sian sekvontan, sed ilia nura interligilo estos la kaŭzeco, la karmo.

La malkono povas esti individua, aŭ persona, rilate kun la "Ordo rerum", kiu, por plui, blindigas la estaĵojn per la fenomenaj iluzioj. Evidente, ne ekzistas fenomenaj ordo ekster (aŭ sen) la fenomenoj : tiu ordo staras kvazaŭ (matematika) funkcio, kiu, per ia probableco, elestigus sennombrajn manifestatajn eblecojn el sennombraj nemanifestataj eblecoj. Pri la malvido, vidu ankaŭ la paragrafojn pri la impulsoj.

#### b)"Depende de la iĝfaktoroj estiĝas la konscio"

La konscio, la disiganta kono (**vijñāna**), efikas per la ses sentumoj. Ni konsideru unu ekzemplon pri la vida sentumo. Iu ajn formo videbla aperanta en la vida kampo estas nun impresanta ies okulon, estigante do vidan sentumaĵon. Se la cerbo ricevas la surretinan impreson, "integrante" (laŭ preskaŭ matematika analiza senco, kaj kun senco "propriganta al si") la sentumaĵon, tiam estiĝas percepto, nocio pri la karakteroj de la formo : "tio estas infano", "tio estas arbo", ktp. Sed plejofte la procezo tie ne haltas. La percepto ebligas reestigi en nescianta homo iujn iamajn sentajn aŭ emociajn psikajn faktorojn : ĉagrenon, malamon, deziron, malĝojon, ktp., t.e. la iĝfaktorojn. Tio kaŭzas novan konsciomomen-

ton maltrankvilan ; reciproke, tiu nuna nekvieta konsciostato naskas plifortigon de la iĝfaktoroj. Tiel la intaj psikoimpresoj, la **saMskâra**, influas, transformas la konscian fluon, kiu normale fluadus kviete, senonde, kiel dum profunda dormo.

c) "Depende de la konscio estiĝas la korpa-psika individueco"

Ĉiumomente la konscio modle impresas kaj la korpon kaj la psikon. Se la konscio ekzemple imagas militon, ĝi imagevidas masakrojn, bombardojn, suferojn, ktp. Tuj la psiko malklariĝas, malgajiĝas, malgraŭ hodiaŭa suna vetero, kaj la korpo, antaŭe ĝoja, iĝas peza, teda, melankolia. Ni eĉ ne aludu la nuntempajn psikajn-korpajn afekciojn ĉiam plimultiĝantajn : ulcerojn, kancerojn, ktp., estigitajn de la malkontento, la angoro, la nekvieta.

Laŭ la budhisma psikologio, la ekzisto estas nedisigebbla de la individua konscio : "la konscio apogas sin sur la korpo-psiko (**nâma-rûpa**), kaj la korpo-psiko apogas sin sur la konscio", kaj : "tiu korpo mia (...) estas forigeblaĵo, eluzebla, detruenda, rompebla, dismembrigebla, kaj al tio mia konscio estas algluiĝinta, alligita".

ĉ) "Depende de la korpa-psika individueco estiĝas la ses sentumaj bazoj"

Se ĉiumomente la korpaj kaj mensaj sentumaĵoj ne "nutrus" la individuon, li forpasus. La "sentumaj bazoj" estas kaj internaj, individuaj sentobazoj (la ses sentumoj), kaj eksteraj (la ses sentumokampoj: vidokampo, ktp.).

d) "Depende de la ses sentumaj bazoj estiĝas la kontakto kun la senteblaj aĵoj"

Evidente, kiam kunestas okulo kaj videbla aĵo, estiĝas kontakto, vida impreso. Simile pri la aliaj sentumoj.

e) "Depende de la kontakto estiĝas la sensacio"

La kontakto estas konscie nepartie notata, sen kaŭzi individuan reagon. Sed la sensacio estas sentota de la korpa-psika individuo kiel agrabla,

malagrabla aŭ neŭtrala objekto, laŭ la individuaj korpaj-psikaj karakterizoj.

f) "Depende de la sensacio estiĝas la soifo"

Jen la kulmino de la dramo. Reaj sensacioj elvokas soifan reserĉon de sensacioj. Ju pli homo estas impresata de siaj sentumoj, des pli li deziras resenti. La sensacio pliaktivigas la sensaciovolon, pli impresbligas la sentumojn, kiuj tiel iĝas pli intense sentivaj. La sato pro abundeco aŭ ripeto de sensacioj ne estas soifostingo : post la sato reaperas pli intensa soifo. La soifo "laboras" por la karmo, laŭ la dua veraĵo pri la origino de la sufero.

g) "Depende de la soifo estiĝas la alligiteco (al la fenomenoj)"

Per "alligiteco" estas tradukita **upādāna** : "daŭriganta substrato". Kaj fakte la **upādāna** estas la ĉefa kaŭzo de la iĝo. Dum oni rekonas la soifon per arda deziro de sento, la alligiteco kuŝas en pli profunda nivelo : ĝi estas rimarkebla en homo baraktanta kontraŭ la morto, en malsanulo apud baldaŭa forpaso.

Tiu kaj konscia kaj nekonscia alligiteco alkatenas onin al la "rado de la vivo" (**saMsāra-ĉakra**), al la fenomena mondo.

ĝ) "Depende de la alligiteco estiĝas la iĝo"

La sentuma alligiteco pensigas onin : "morgaŭ mi faros tion ; la venontan jaron mi faros tion ĉi, ktp.". Tiel estas teksita la ĉiutaga vivovolo, fortika ĉeno, pasanta vefto. La alligiteco estas la karma substrato por la onta iĝo.

h) "Depende de la iĝo estiĝas la naskiĝo"

Temas pri la ontaj ekzistoj. Tamen, sen uzi tiun hipotezon, ni konsideru, ke ĉe ĉiu individua interna ŝanĝo estiĝas samtempe morto kaj naskiĝo : unu ĉelo naskiĝas, alia mortas ; unu penso naskiĝas, kreskas, mortas, alia estiĝas depende de la antaŭa kaj preparas sian sekvontan. El onia infaneco restas neniu ĉelo, neniu penso, sed oni konstatas kontinuecon eksplikitan de tiu ĉi antaŭlasta kaŭzligilo.



f) "Depende de la naskiĝo estiĝas la maljuneco, la morto, la ĉagrenoj, la lamentadoj, la afliktoj, la doloroj, la malespero"

Ekzistante, oni direktas sin ĉiumomente al kadukeco, stulta maljuneco, malsanoj, kaj finfine al morto. Tiun kadukecon vivema, juna kaj sana homo klare ne antaŭvidas, pro sia vivovola sinadmiremo (**mâda**). La tradicia komentario temas pri la sinsekvaj renaskiĝoj, kiuj ĉiufoje kuntrenas maljunecon, morton, ktp., kaj certe ja ĝojojn - kiel preterflugajn!

### C) La tri karakteroj de la fenomenoj

Kial la fenomenaj ekzisto estas plejofte elrevigada? Kial eĉ en feliĉaj momentoj ĝi estas komparebla kun fatamorgano, veziko, rosguto? Pro la tri fenomenaj karakteroj: sendaŭreco, malkontentigo, senesenco (aŭ: "senmemeco"). Ĉiuj fenomenoj naskiĝas kaj foriĝas, ili estas nedaŭraj, do malkontentigaj, dolorigaj. Kaj fine ili ne havas esencon, substraton, daŭran enton, memrealecon. Kiel cepoj post ĝisfina senhaŭtigo, nenio restas el ili. Tiu tria lasta karaktero estas budhisma apartaĵo: laŭ la darmo ĉiu aĵo, ankaŭ la memo, estas senesenca. La ceteraj doktrinoj supozas aŭ asertas esencon, memon, ĉiaman **âtman** (memo). La sola budhismo nepre asertas la "sen-memon", la malplenecon de ĉiuj aĵoj, malsimplaj (konsistigitaj, fenomenaj) aŭ simplaj, kiel la nirvano; ĉar - pri tio oni ne trompiĝu! -, la nirvano ne enhavas la ekziston nek la neekziston: ĝi estas la sennaskiĝeco, la senfariĝeco, la estingo de la ekzistaĵeroj, sed neniu "principo". Iu fama formulo precizigas la aplikadokampon de la tri karakteroj: "ĉiuj fenomenoj (**saMskâra**) estas sendaŭrecaj, ĉiuj fenomenoj estas malkontentigaj (**duHkha**), ĉiuj aĵoj (**dharma**) estas senmemecaj (**anâtman**). Tiel la nirvano estas senesenca; tamen la aparta homa malforto iam provis prezenti ĝin kiel "esencan staton"...! Fakte la tria karaktero estis kaj estas tre malfacile konsentata, des pli nuntempe, kiam la "ego" estas forte nepridubebla, pli kaj pli ekzaltata, kvankam ĝi pli kaj pli mizeras... Eĉ se oni bonvole konsentus la hipotezon, estus ekaperontaj kontraŭargumentoj.

"Cogito, ergo sum" ! "Mi estas tamen konanta mian memon, memoranta la hieraŭan tagon, la pasintan jaron, kaj multajn pasintajn epokojn..." La budhismo konsideras la memon nur kiel serion, kontinuecon, sinsekvon de interkaŭzaj eroj. Kiel la lumo, la ekzisto enhavas du aspektojn : unu nekontinuan : kompare kun la fotonoj, tiuj disaj energiograĵoj, la "ekzisteroj" estas la ĉiumomentaj individuaj ŝanĝoj (aperoj kaj mortoj de ĉeloj, de pensoj) ; unu kontinuan, la karmon, nematerian kaj rezone nekompreneblan influon, kiu, kune kun la genetika trajtaro, kondukas la korpajn-psikajn ŝanĝojn. Simile, la karmo estas komparebla kun luma ondo reganta la enspacan dislokiĝon de la fotonoj.

La memora persisto kredigas onin je persisto de iu memo, simile kiel pro la surretina persisto oni kredas kontinua filmon tamen konsistantan el disecaj bildoj. Kio restas el la suĉinfaneca memo ? El memo dum profunda dormo, aŭ tuj post narkoto? La konstruo de la memo, tiu plej grava iluzio, neprigas aperon de la aliuloj. "La infero, tio estas la aliuloj", ne!, la infero estas la memo, kiu kreas la aliulojn, deziras tion (tiun), kio (kiu) firmigas lin, kaj malamas tion, kio neas lin. Ni citu fine alian faman budhisman formulon, koncernantan ĉiujn sensaĵojn, ĉiujn fenomenojn : "ne tio mi estas, ne tio estas de mi, ne mia memo estas tio".

### Ĉ) La 5 eroj konsistigantaj la homan individuecon

Tiu tradicia distingo rilatas kun praktikema analizo, laŭcela kaj iel "sinteza", "centripeta". Male, la moderna scienca fenomena analizo estas centrifuga; ekzemple ĝi konsiderus kiel revaĵojn la antikvajn analizojn bazitajn sur la kvar elementoj (tero, akvo, fajro, aero) - "Ĉiu scias, ke la akvo estas kombinaĵo el oksigeno kaj hidrogeno, sed ne iu malpreciza "elemento" -..." Tamen, laŭ transcerbumada vidpunkto, la fenomena analizo estas senfrukta, ĉar ĝi estas senfina, ne atingas la transon de la fenomenoj kaj senĉese reirigas foren la dialektikan konadon pri ili : la oksigeno mem konsistas el materieroj, kiu mem estas analizeblaj ĝis fantomaj

matematikaj reprezentaĵoj.

Laŭ la pragmatisma budhisma analizo, la homa individueco estas disigebla en kvin erojn (**skandha**):

- la formo (**rûpa**), t.e. la korpoj, ĉiuj korpaĵoj;  
- la sentumaĵoj (**vedanâ**) : ĉiuj sentaĵoj, sen iliaj psikaj sekvoj ;

- la perceptoj (**saMjñâ**), la nocioj, rezultoj el sentumaĵoj konataj de la psiko. Kiel ekzistas ses sentumaĵaroj pro la ses sentumoj, tiel estas ses grupoj da perceptoj ;

- la iĝfaktoroj (**saMskâra**), psikaj impresoj, kaj rezultoj kaj kaŭzoj de konsciaj intencaj pensoj aŭ agoj. En donita momento, ilia tutaĵo estas la karmo. Ili estingiĝas ĉe la nirvano, dum la aliaj kvar konsistigaĵoj plu daŭras (estingiĝontaj nur ĉe la **parinirvâNa**), "kiel la rado de la potfaristo ankoraŭ turniĝas, post kiam la piedo lasis la turnilon" ;

- la konscio (**vijñâna**), la disiganta kono, fakte kunigas ses konsciojn rilatantajn kun la ses sentumoj.

Homo konsistas el tiuj kvin grupoj ; se malestas unu el la kvin, ne ekzistas homa individueco; sed neniu konsistigaĵo aparte estas la individuo, nek iu "memo". La skribaĵoj komparas la korpon kaj la psikon kun "du garboj da pajlo sin reciproke subtenantaj". Ni citu parton de iu fama sutro (**hRdaya-sûtra**) pri la kvin konsistigaĵoj :

"La nobla **bodhisattva** (...) atente rigardis ; li ekvidis kvin konsistigaĵojn, malplenecajn memnature. Jen, **ĝariputra** : la formo estas la malpleneco kaj la malpleneco estas la formo ; la formo estas nur malpleneco kaj la malpleneco estas nur formo; kio estas formo, tio estas malpleneco ; kio estas malpleneco, tio estas formo. Tiel same koncerne la sentumaĵojn, la perceptojn, la iĝfaktorojn, kaj la konscion. Jen, **ĝariputra**, ĉiuj aĵoj karakteriziĝas per la malpleneco : ili estas sen estigiteco, sen malaperinteco, sen malpureco kaj sen pureco, sen malesto kaj sen pleneo..."

La § B) b) prezentas ekzemplon pri interfunkciado de la 5 eroj.

## D) La impulsoj

Malfacile koneblaj en la maldormostato, la impulsoj estigas pli konscie riceveblajn inkliojn (**anuĉaya**), kiuj mem proprigas al si rekte kaj facile koneblajn objektojn. Oni kutime prezentas tri aŭ kvar impulsojn :

### a) impulso de la sentuma deziro (dezirovolo)

La senĉesa vigleco de la sentumoj ĝenerale estas nek atenta nek kontrolata. La budhista ekzercado bezonas koncentriĝon de la mensaj kapabloj, ofte malhelpatan de la deziro por mensaj logaĵoj. Ĉiuj deziroj profunden unuiĝas por nutri nekonscian fluon reestigontan novajn dezirojn. Tiu impulso estas la "deziro de deziroj".

### b) impulso de la iĝo (vivovolo)

Tre profunde kuŝante, la vivovolo elvokas la plej grandajn fiagojn. Post parolado pri la nirvano, kiom multfoje ni aŭdis tiun ĉi timplenan ekkrion: "tiam oni plu ne estas vivonta!". Estas kvazaŭ la komuna ulo ne povus rezisti kontraŭ tiu impulso. La ekstrema transkono estingas ĝin kaj la kontinuecon de la konsistigaĵoj.

### c) impulso de la malvido, de la nescio (malvidovolo)

El la profundo de la nekonscio, ĝi kaŝas la realajn karakterojn de la fenomenoj. Ekzemple ĉiu homo scias, ke la morto estas certa, ke ĉiuj fenomenoj estas nedaŭraj. Tamen ĉiu agas kvazaŭ la aĵoj estus ĉiamaj, kvazaŭ oni estus ne mortonta. Kial? Tial, ke ĉiu kono estas supraĵa, dialektika, kaj, ke de la fundo de la nekonscio la malvidovolo, la ignoro, malhelpas, ke tiu kono iĝu kompleta.

Kiel knabino dorlotanta sian pupon, la komuna ulo amas, protektas sian "memon" kaj la "aliulojn", kiuj certigas lin. La "persono" kun enmonda transkono ne plu konceptas sian "memon" disigita de la aliaj ; tamen li "komfortigas" ĝin ; li scias, ke liaj infanoj estas "vezikoj" aperintaj kaj krevontaj sed li zorgas pri ili. La Vekiĝinto elsekigis tiun âsrava kaj neniel estas devigata agi.

### ĉ) impulso de la opinioj

Tio estas la emo ekspliki, analizi, havi certajojn, trovi "la" kaŭzon de la fenomenoj. Ĝi kondukas al malveraj opinioj, religiaj aŭ politikaj sistemoj, kredoj. El identa absceso fontas eĉ la scienca analizado ; la sciencistoj, traserĉante la fenomenojn kiel porkoj trufojn, de tempo al tempo malkovras "eltrovaĵon", tuj ekkaptotan de registaroj, militistoj, aŭ ŝakristoj.

Oni devus adopti nur pravajn vidojn, kiel hipotezojn, ĝis elsperta certigo. Tiuj vidoj estas tiuj de la budha darmo, aŭ de alia ajn darmo proponanta ilin : vidi, ke la vivo estas precipe peza, sufera, ke la sufero devenas de la soifo vivi, ke la estingo de la soifo ĉesigas la suferon, kaj ke la okera budhisma vojo kondukas al tiu estingo.

### E) La budhisma amo

Iuj riproĉas al tiu darmo ĝian sekecon. La serĉo al absoluto, la dissolvo de la "ego", la estingo de la ekzisteroj (nirvano) ŝajne ne kunstarus kun ia speco de amo.

Tamen la budhisma amo (*maitrî*) estas senlima amo, sen subjekto kaj objekto, senprefera, seninklina kaj evidente sen voluptemo. Ĝi kontraŭas al malbon-intencaj kaj agresemaj impulsoj, sed ĝi devas esti prilumata de la transkono.

### F) La dek jugoj (saMyojana)

Tiuj jugoj katenas la homon al lia iluzia kondiĉo, al la *saMsâra*, la vagado. Ilia grada rompo kondukas al la libero, laŭ kvar niveloj, el kiuj la lasta estas la grado de la komplete liberiĝinta *arhat*. Ni citos nur la kvin plej fortikajn jugojn :

#### a) kredo je iu "memo"

Kredo je senmorta animo, eterna ento tute disigita de la aliaj. Estas la unua kaj plej fortika el ĉiuj ligiloj, sen kies rompo oni ne eniras la vojon. Tiu rompo ne estas la tuta forigo de la "ego", efektivigita de la *arhat*, sed la ĉeso de certeco je iu "memo", kredo kiu eĉ malhelpas, ke oni konsideru la hipotezon de *anâtman*.

## b) la dubemo

Tio estas negativa, sterila dubo. En la budhismo ne ekzistas blinda fido, sed fidemo de ekzercanto, kiu juĝas eblaj la darmajn hipotezojn, kaj sekvas memvole la vojon, kiel eksperimentanto.

## c) la alligiteco al moralaj reguloj, al ritoj

La homaj kredemo kaj timo imageformas superpotencan dion, adorendan kaj alpreĝendan kreinton. Aliflanke, la socioj, por plui, precipe kiam ili estis apud kadukeco, estis devigitaj trudi tabuojn kaj regulojn, kiuj preskaŭ fariĝis ritoj. Estas interese scii, ke la sanskrita vorto **rita** signifas : "justa ago", "ago prava laŭ metafizika direkto" ; ĉar en la pratempoj (la "Ora Tempo") estas supozeble, ke ĉiu korpa kaj psika faro estis "laŭregula", kontentiga. Postsigno de prahistoriaj teruroj aŭ sopiro al "oraj tempoj", la alligiteco al la ritoj estas fortika kateni. La alligiteco al moralaj reguloj devenas de aliaj kaŭzoj : temas pri "sklerozo" okazanta kiam oni ne komprenas, ke la reguloj estas rimedoj, ne celoj. Kial la paŝanto kunportus kun si la montraĵajn fostojn ? (vidu la paragrafon pri la etiko).

## ĉ) la sentuma avido

Tiu tre potenca ligilo estigas neprecizan inklinon al "deziro de deziroj", kaj forlasas la homon al multegaj deziroj, ekde la plej krudaj (nutraĵo, sekso) ĝis la plej subtilaj (poezio, muziko, dialektiko).

## d) la agresemo

Repeligas tion, kio minacas kaj kontraŭas la memon. Tiu jugo, kaj la ceteraj, estas rompenda ne nur en sia konscia aspekto, sed ankaŭ en sia nekonscia, kio estas pli malfacile farebla.

La kvin lastaj jugoj estas pli subtilaj (ili estas enfine englosarigitaj).

## KONKLUDE...

Se kun la termino "budhismo" oni konceptus filozofian aŭ sciencan sistemon celantan priskribi ekzakte la realon, tiam tiun ĉi ismon la Oriento ne rekonus. Sed la Oriento fakte konas la budhan darmon, la instruon de la Vekiĝinto, kiel priskribadon de la mondo (inter aliaj eblaj priskriboj), kies kialo estas ne ĝi mem, sed ĝia fornuliĝo en la absoluta veraĵo. La relativa veraĵo, difinita el la kondiĉoj de l' ekzisto, estas des pli prava, ke ĝi povas konduki al la absoluta veraĵo. Tiu grava distingo inter la du specoj de veraĵoj insiste memorigas onin, ke ĉiuj paroladoj, vortoj, signoj, strukturoj, estas nur dirmanieroj, kaj ke la ekstrema kono estas nepriskribebla, senkoncepta, transparenta.

Ĉu estas mirinde esti interesata de iu liberiga vojo aperinta jam de dumil kvincent jaroj, en malproksima Oriento ? Tute certe Hindio ne estas apuda regiono, sed la intelekto ne agnoskas limojn, des malpli, en tiu ĉi kazo, ke la plimulto el la okcidentaj popoloj kaj la aziaj Arjoj estas heredantaj tiun hindeŭropan animstaton evidentigitan de komparaj studoj pri nunaj lingvoj kaj institucioj. Kvankam la okcidenta moderna vidpunkto pri mondkonceptado malkovras sin profunde nesimila je la antikva, iu mensostato transpasiĝis, kiu atribuas nepridiskuteblan superecon al la racio, tiele, ke la "rezonanta racio", forlasita al si mem kaj devojigita, hodiaŭ transformiĝis en tro striktan racionalismon.

La darmo ne konsideras la homon kiel anon de iu socia kasto aŭ de iu popolo, sed kiel individuon konstruitan laŭ la homspeca modelo, kiel psikan-korpan organismon, funkciaron kaj faktorarojn, kies vivo estas biologia kaj psikologia fluado kun momentoj de fenomenaj individua konscio. En tio ekzistas nenio tradaŭra aŭ esenca. Sed en tiu kondiĉata ekzisto kuŝas iuj kapabloj povantaj alirigi ĝis priabsoluta kono.

Por aŭskultadi metafizikan instruon kiel tiun ĉi, necesas ke la racio superu la alligitecon al kredoj,

ke la volo esti libera superfortu la bezonon de ritoj, de signoj, ke la serĉo de senkondiĉeco antaŭ la tenton alteniĝi al iu sistemo. La darmo povas tuŝi tiujn, kiuj neniel konsentas fideindecon al ideologioj, al dogmemaj religioj, al mitoj, al fantaziaj "hipostazoj".

El kio konsistas tiu darmo ? Kie trovi aŭ retrovi ĝin ? Ĉu ekzistas en ĝi fundamenta kerno, precipa tradicio rekonebla en la skoloj ? Dum sia disvastiĝo, la darmo naskis plurajn skolojn, sinsekve kreitajn, sed hodiaŭ samtempajn. Ĉiu konservas siajn metodojn sed malestimas la ceterajn skolojn, asertante sin solan vera kaj supera. La kerno de la darmo konsistas el la "kvar veraĵoj", - kiuj ne estas legendoj, sed konstatoj -, el la ĉeno de interdependaj originoj, - kiu indikas la interdependajn kondiĉojn por estiĝo kaj konsekvence foriĝo de l' ekzisto -, el la 37 helpiloj al vekigi kaj el kelkaj aliaj analizoj. Tiujn bazajn elementojn enhavas ĉiuj skoloj. Kiu apogas sin sur ili, tiu preterlasas la stultan kaj afliktantan interdisputon inter **Mahâyâna** kaj **Theravâda**. La **Mahâyâna** vane penus indiki kriteriojn vere metafizikajn por aserti la superecon de sia metodo, kaj la **Theravâda**, juĝante neaŭtentika la sanskritan skribaĵaron, tamen ne rajtas pretendi sin la sola pura budhismo. La darmo estas unueca, la nocio pri **anâtman** estas ties nura fundamento. Nur kompromise bigotaj kaj kredaj elementoj estis enhavitaj de iuj tendencoj ; tio tro ofte forkaŝis la faktoron "kono". Pro sklerozo, pro bezono de pieco kaj de pozitivo, la diversaj skoloj ne plu obeis la instrukciojn de la sendube aŭtentika "**Kâlâmasutta**". La malnova bezono de pio, de kredo, havi patron, "majstron", deformis la originalan darmon, krome eble en la "Soto Zen" skolo, apartege negativa, kvankam ĝi ankoraŭ turnas sin al "majstro". Aliflanke, la skribaĵoj enhavas neverŝajnajn rakontojn kaj fabelojn, kiuj ofendas la racion kaj la juĝkapablon. Ni inkliniĝas vidi en tio iompostiomajn defalojn, aldonaĵojn, degenerojn, tial ke la instruado estis parola dum tricent jaroj. Sed en ĉiuj ekzegezoj kaj tekstaroj estas troveblaj iuj sensanĝaj propozicioj, kiuj konsistigas la strukturon de la darmo,



kelkaj kernaj nocioj, kiujn ni raportis en tiu ĉi studaĵo. La budhisma doktrino ne estas kredaro, opiniaro, spekulativaĵaro, intelekta kontraŭaĵaro el personaj imagoj aŭ el guruoj. Forigante ĉiujn vanajn demandojn, Budho diris al siaj kunparolantoj: "Mi instruas nur la liberigon kaj la vojon al ĝi". Do neniam filozofan sistemon aŭ kosmogenezon.

Aliflanke, la sola racieco ne kondukas absolute. Ĝi povas analizi la fenomenojn, trovi leĝojn, esplori kaŭzojn kaj rezultojn, per disigo de la subjekto disde l' objekto ; sed dum tiu raciuleco ne estos formutigita, ne venos ebleco aliĝi al absoluto. La racio devas senpasiege disanalizadi por pretigi per siaj konkludoj onin al percepto de la absoluta malpleneco. Krom purigi la nekonscion per "katharsis", necesos ankaŭ "vidi" la perfidon de la parolo, ŝajne kolorita de realo, dum ĝi estas nur indikilo; necesos "dresi" la racion, per konstanta vigleco, por daŭre vidi la malplenecon de la fenomenoj. La vortoj, la logiko, la matematiko - tiu eksterordinara logiko kun siaj apartaj simboloj -, nur indikas la vojon. Pro tio, la gnozema budhismo ne kunportas guruon aŭ personon, al kiu oni devus neŝanceleble fidi : "Estu mem cia propra lumo, cia propra torĉo" ; "la memo estas mastro super la memo". Ne estas kalkulende pri la influo de iu homo por liberiĝi : "La vekigintoj montras la vojon, vi mem devas sekvi ĝin".

## SANSKRITA GLOSARO

\*\*\*\*\*

Tiu leksikono enhavas la ĉefajn konceptojn de la budhismo uzitajn en nia traktafeto, tradukitajn esperanten kiel eble plej precize.

\*\*\*\*\*

- \* **ahiMsa** : neperto (etimologie : "sen-damaĝo").
- \* **âkâça** : spaco, kampo de la materiaĵoj, la "etero".
- \* **anuçaya** : inklino, psika inklino, psika klimato. Konebla manifestaĵo de la impulsoj. Ekzistas sep psikaj inklinoj : la avido (por sentumaj deziroj), la agresemo, la opinioj, la dubemo, l' orgojlo, la vivovolo, la malvido.
- \* **arhat** : la tute liberiĝinta "nirvaninto" ; li rompis la dek jugojn.
- \* **ârya** : 1) arja, rilata al prahindaj triboj ;  
2) nobla, eminenta (ties traduko per "sankta" tute ne konvenas!) ; **arya-satya** : la noblaj veraĵoj.
- \* **âsrava** : impulso (etim. "fluaĵo", "pusaĵo") ; estas psika tokso senĉese fluanta, kiel pusaĵa fluo el profundaj nekonsciaj fontoj, pro kiu la psiko ne povas liberiĝi el la homokondiĉaj ligiloj (signifo simila je freŭdisma aŭ jungisma) ;  
**bhavâsrava**, **kâmâsrava**, **avidyâsrava** : vivovolo, dezirovolo, malvidovolo.
- \* **âtman** : memo (**âtman** estas sanskrita adverbo signifanta "mem") la si-memo, la "spirito" (vd. germane "atmen" = spiri). Fundamenta nocio de iuj hindaj pensistemoj, malagnoskita de la budhismo.  
**anâtman** (sen-memo) : propre budhisma aserto, laŭ kiu ekzistas neniu "memo", nenia animo aŭ propra naturo.
- \* **avidyâ** : malvido (radiko -VID-, vidi, rekte koni). "Vidyâ" estas la postvekiga "vido" de la aĵoj tiaj, kiaj ili estas. **Avidyâ** estas la nescio, la malkono, fonto de la enmonda vagado, "patrino" de la **saMskâra**, kies rezulto estas la karmo.
- \* **âyatana** : bazoj de la fenomenaj kono : la ses sentumoj kaj la ses sentumokampoj.
- \* **bhâvanâ** : ekzercado, mensa disvolvo, perfektigo.

La termino "meditado", kvankam tre uzata, estas pli mallarĝsignifa kaj ne sufiĉe konvena.

\* **bodhi** : vekiĝo (vd. **bodhisattva** kaj **buddha**). Neforigebla, sentempa, ekster la tempo, ĝi okazas subite, fulmorapide. La vekiginto konceptas nek antaŭan nek postan tempon, ĉar li ne havas surbazigon, sciante relativa ĉiun ajn baziĝosistemon. La dormanto konis nur la eraran endorman tempon, dum ne plu ekzistas tempo al la vekiginto, la liberiginto, kiu "estas ekster" ekzisto kaj neekzisto. Darmaj dividaĵoj : la 37 helpiloj al vekigito, la 7 membroj de l' vekigito, ktp.

\* **bodhisattva** : bodisatvo ("vekigoekzistulo"), ekzisto decidiĝinta por la vekigonteco, por konduki kiomeble plej multajn estaĵojn al la nirvano. Koncepto aplikita de la **Theravâda**-skolo pri Budho, kaj poste de la **Mahâyâna**-skolo pri ĉiuj estuloj.

\* **buddha** : vekiginto, iluminiĝinto (kp. laŭ hindeŭropa radiko ruse "buditj" = vekio, angle "bud" = burĝono, ktp.). La radiko -BUDH- (vekigi) indikas eliron el malkona dormo, el sonĝo (vd. **bodhi**). La "stato" de vekiginto estas nestato, dialektike ne difinebla.

\* **citta** (pron. ĉita) : psiko, tuto de la psikaj funkcioj. La signifamplekso de tiu ĉi vorto superas tiun de "penso", "cerbofunkciado". Ĝi rilatas ankaŭ kun la "koro", kiel ejo de sentoj, de imago (tial la ĉinoj tradukas **citta** per l' ideografiaĵo "ŝin", koro), kaj de la intelektiaĵoj. "Animo" estus taŭga traduko, se oni forigus la sencon de "senmorta animo". Simile, "spirito" (termino, kiu ne ekzistas en budhismo) tute ne konvenas.

\* **ĉila** : etiko ; vd. ankaŭ **ahiMsâ**.

\* **ĉûnyatâ** : malpleneco, vakuo (kp. laŭradike, helene "kena", latine "cavus", angle "swell", arabe "sifr", esp-e "kava" kaj "vakuo", ktp.).

1) malpleneco-vezikeco de ĉiuj fenomenoj, ilia senmemrealeco : ili vezike aperas kaj vezike krevante malaperas. Tiu nocio estas kunmetenda kun **tathatâ**. Oni tradicie distingas 18 "**ĉûnyatâ**-karakterojn".

2) absoluta malpleneco, la nenio ;

La nescianto identigas sin kun la spektaklo ; tiu, kiu konas la malplenecon-vezikecon (laŭ enmonda transkono) disigas la spektaklon disde la spektanto ;

kaj tiu, kiu konas la absolutan malplenecon (laŭ ekstrema transkono) neniigas la spektanton, kaj do la spektaklon.

\* **dharma**

(radiko -DHAR- teni, porti, do "dharma" = tenilo).

1) darmo (laŭ P.V.: "darmo") ismo, instruaĵo, vojo;

2) aĵo, fenomeneca aŭ ne. Ekz. la spaco (**ākāṣa**)

kaj la nirvano estas nekondiĉaj **dharma** ; laŭ la kvarera logiko, ili estas, ne estas, kaj estas kaj neestas, nek estas nek neestas, dum la malsimplaj fenomenoj (**saMskāra**) nur "estas" ;

3) mensaĵo 4) vero, ktp.

\* **dharmatâ** : "aĵeco", naturo de la aĵoj, fenomenaj ordo.

\* **dhyâna** (tiu vorto estigis ĉine : Ĉan, kaj japane: Zen). La ok **dhyâna** estas konsciostatoj subtilaj, senspacaj, sentempaj, rezultantaj el ia ekzercado (atento pri spirado, aŭ alia). Ili malsimilas je la tri komunaj konsciostatoj : la kompleta dormo (profunda dormo), la kunsonĝa dormo (kompensanta la nekonscion), kaj la maldormo (kiu estas al la vekiginto alia kunsonĝa dormo).

La **dhyâna** trankviligas la korpon kaj la psikon. Kiam la psiko estas senmova, la transkono ebligas ekesti, la **anuçaya** estas koneblaj, kaj la **âsrava** estas elsekigeblaj per psika "katharsis". La **dhyâna** liberigas el la kateno de la **kâma-loka**.

"Dhyâna" estas termino ankaŭ de la joga sistemo, kun pli-malpli simila signifo.

\* **duHkha** : sufero, malkontentigo. Enhavas ĉiun staton de malkomforto, de malfeliĉo. La budhismo celas nur forigi la suferon, econ de ĉiuj fenomenoj (laŭ la unua veraĵo). Tamen la darmo ne estingas la fiziologian doloron : la vekiginto povas suferi, sed "neniu suferas", dum korpe suferanta nevekiginto volvas sian iluzion memon en la sufero ; el tio la nocio pri **duHkha-duHkhatâ**, la sufero pro sufero.

\* **hînayâna** ("eta vojo") vidu **theravâda**.

\* **hRdaya-sûtra** ("kor-sutro") : "kora sutro de la granda transiranta transkono", fama **mahâyâna** sanskrita sutro.

\* **kâlâmasutta** : "sutro al la **Kâlâma** gento". Jen ekstrakto el tiu teksto :

"Ne fidu (akceptu kiel apogon) raportojn, tradicion, onidirojn, skribaĵojn, konjektojn, logikaĵojn, rezonadojn, ekzamenon kaj konsenton pri iu ajn teorio, ies ŝajnan kapablecon (por instrui), la penson : "tiu asketo estas nia guroo". Kiam per vi mem vi konas : "tiuj faroj estas malfavoraj, mallaŭdindaj, rifuzataj de la saĝulo" (...) forlasu ilin (...). Kiam per vi mem vi konas : "tiuj faroj estas favoraj, ne mallaŭdindaj, laŭdataj de la saĝulo, kondukas al bonstato kaj feliĉo", tiam akceptu kaj konservu ilin".

\* **Kâma** : deziro, la Deziro, la mita "Amoro". **Kâma-loka** ("la loko, la mondo de la deziro") : la mondo de la kruda materio. La du aliaj pli subtilaj mondoj estas la **rûpa-loka** (subtilforma mondo) kaj la **arûpa-loka** (senforma mondo).

\* **karman** : karmo (radiko -KAR-, krei, fari, do **karman** = ago, ellaboraĵo, faritaĵo). Rezulto el la intencaj agoj, kaŭzeco pri la fariĝo de la estaĵoj (vd. **saMskâra**). Tiu nocio estas apogita de la renaskiĝismo (ne konfuzu renaskiĝon kaj "metempsikozon", tiu lasta nocio ne estas budhisma !). La darmo indikas metodon por "vidi" la antaŭajn ekzistojn. Nur tiamaniere la hipotezo estus certigita, sed nuntempe ŝajnas, ke estas malfacilege estigi tiun "malantaŭenan" vidon... (pro malkoncentriĝemo).

\* **kuçala** : favora, **akuçala** : malfavora (al la ekzercado). En la budhismo ne ekzistas antagonismo inter "bona" kaj "malbona", tiuj terminoj estas do malpli taŭgaj por traduki **kuçala/akuçala**.

\* **maitrî** : amikeco, la pura amo. Ekzistas tri aliaj aspektoj de la budhisma amo : la kompato, la ĝojo kaj la senemociemo.

\* **mâda** (el verbo -MAD-, esti ebria, freneza ; kp. angle "mad" = freneza). Blindo de la psiko pri estontaj maljuneco, malsano kaj morto.

\* **mahâyâna** ("granda vojo") : la budhismo en Tibetio, Ĉinio, Japanio. Bazite sur la sanskrita skribaĵaro, ĝi estigis "dialektikajn" skolojn, kiel "malplenecismon", "nur-konscio-idealismen", antaŭ ol Ĉankaj Zen-skolojn.

\* **manas** : menso (kp. angle "man", "mind", latine "mens", ktp). Propre homa funkcio de la **citta** (ne ekzistas besta **manas**). Ĝi kontrolas la kvin

ceterajn sentumokampojn (**âyatana**), efikas en esprimaj kaj sciencaj terenoj, kaj en la "metafizika" traserĉo.

\* **mârĝa** : vojo, rimedaro por estingi la soifon, do la suferon ("4-a veraĵo"), okera vojo.

\* **mâyâ** : iluzio ("magio", estigo de iluzio, ŝajnaĵo). Termino de la hinda **vedânta**-filozofio koncerne la nerealecon de la fenomenaj mondo ; termino iam uzadita ankaŭ fare de la budhismo. Notu, ke etimologio de la vorto "fenomeno" indikas (helene): "aperiĵo, ŝajnaĵo".

\* **nâman** : psiko (laŭvorte : nomo, naturo). Kunigas la 4 psikajn funkciojn : sentumaĵojn, perceptojn, iĝfaktorojn, konscion, - kontraste kun **rûpa**.

\* **nirodha** 1) ĉeso de la sufero, de la iĝfaktoroj (vd. la 3-an veraĵon). 2) momenta ĉeso de ĉiuj korpaj kaj psikaj agoj, eventuale okazanta post la ok **dhyâna** ; estas "tuŝi nirvanon per la korpo".

\* **nirvâNa** : nirvano. Ekzistas pluraj eblaj etimologioj: a) -Vâ-, blovi, do la nirvano estas blovestingo de la eroj konsistigantaj la ekzistaĵojn (kiam oni demandis Budhon pri tio, kio estas la nirvano, li ekblovestingis kandelon kaj petis diri, kien iras la flamo...). b) -VRI-, kovri, do **nirvâNa** = "diskovrita", senligila, libera. La nirvano (la absoluto, laŭ la darmo) estas nek ekzistostato nek neekzistostato nek ia ajn stato. Tradicia komentario estas : "ekzistas sennaskeco, senkreeco, senfariĝeco, senkondiĉeco. Se tio ne ekzistus, oni ne povus eliĝi el la naskiteco, la fariĝo, la kreiteco, la kondiĉiteco."

\* **parinirvâNa** : kompleta, senresta nirvano, ĉe la morto de "nirvaninto".

\* **prajñâ** : transkono ("pra-" signifas "preter, trans", kaj la radiko -Jñâ- signifas "gnozon, konon"). **Prajñâ** estas neesprimebla transdialektika kono de la fenomenoj, transcenda kono esence enestanta en la homo. Ties traduko per "saĝeco", ofte uzata, ne konvenas: per **prajñâ** oni certe ekzercas sin al la "saĝeco", sed la transkono superas la saĝecon.

. **lokika prajñâ** : enmonda transkono, parta, ne vekonta;

. **lokottara prajñâ** : ekstrema transkono, tuttuta, aliriganta nirvanon.

\* **Rta (rita)** : "rito" (laŭvorte, partecipo de la verbo iri, do **rita** = irita) ; "alligiteco al ritoj" : vd.

## saMyojana.

\* **rûpa** : formo, materio, unua ekzistokonsistigaĵo. Temas pri la kvin korpoj konsistigantaj individuon (laŭ hindaj filozofioj) kontraste kun **nâman**, la psiko.

\* **samâdhi** (etim. "kunmetado") 1) koncentriĝo  
2) "kunmetado", psika-korpa sintezo kaj trejnado  
3) aparta simila signifo en vedânta kaj joga sistemoj.

\* **saMjñâ** ("kunkono") : percepto, nocio, perceptaĵo.

\* **saMkalpa** : mensdecido.

\* **saMsâra** ("kunfluo") : la fenomenaj mondo, ĉiam ŝanĝiĝanta kaj "fluanta", kontraste kun la nirvano;  
**saMsâra-Ĉakra** : la rado de la vivo.

\* **saMskâra** ("kun-fara(n)taĵo")

1) iĝfaktoro : temas pri rezultoj, impresoj kaŭzataj kaj kaŭzitaj de intencaj agoj, paroloj aŭ pensoj: ĉe iu ajn donita momento, tiuj rezultoj estas kreantaj la tujsekvajn kondiĉojn por la iĝo. Ili estigas la subkonsciajn **âsrava** kaj estas faktoroj de la karmo. Ili estingiĝas ĉe la vekigo en la **arhat** aŭ la **buddha**.

2) fenomeno, malsimpla aĵo.

\* **samudaya** : origino (de la sufero), dua veraĵo.

\* **samyak** : prava.

\* **saMyojana** (radiko -YUJ-, jugi) ; la dek jugoj: kredo je iu memo, dubemo, alligiteco al moral-reguloj kaj ritoj, sentuma avido, agresemo, deziro por subtilforma mondo, por senforma mondo, orgojlo, mensa distriĝemo, malvido.

\* **satya** : veraĵo, esencaĵo : la kvar **arya-satya**.

• **saMvRtti satya** : "veraĵo kun mensokirloj", relativa veraĵo ;

• **paramârtha satya** : transkonvencia, absoluta veraĵo.

\* **skandha** : la kvin eroj konsistigantaj la homon.

\* **smRti** (-SMAR- = memori) : atentemo, tre grava helpilo al la vekigo. Similaj signifoj : memoro, memkonscio, psikoapliko al, vigla atentemo, rememorigo, klarvido, ktp.

La kvar aplikoj de la atentemo : aplikoj al la korpo, al la sensacioj, al la psiko, al la psikaĵoj.

\* **sûtra** : sutro, budhisma skribaĵo.

\* **ŝâriputra** ("filo de Ŝâri") : iu **arhat**, "pioniro" de la **hînayâna**.

- \* **tathatâ** (tathâ = tiel) : tieleco, eco esti tiela. Ĉiu unuopa fenomeno estas **ĉûnya**, sed diferencas de la ceteraj per siaj propraj fenomenaj karakteroj, estante tiela (tathâ), ne aliela.
- \* **theravâda** ("skolo de la maljunuloj") : la budhismo en Cejlono, Birmio, Indonezio, Siamio, bazita sur skribafaro en lingvo pâli.
- \* **tRŜNâ** : soifo, soifo deziri, vivi, nevivi.
- \* **upâdâna** : alligiteco.
- \* **vijñâna** ("diskono") : konscio, disiganta kono funkcio de la psiko.
- \* **vipaĉyanâ** ("disdividado") : travido, penetranta vido, intuo ; tio estas "vidi la fenomenojn kiaj ili estas", laŭ **ĉûnyatâ** kaj **tathatâ**.
- \* **vedanâ** : radiko -VID-, vidi) sentumaĵo, sensacio.  
\*\*\*\*\*

### Neesperantaj terminoj

- \* **arkeocerebelo**, paleocerebelo, neocerebelo, uzitaj por traduki la latinajn : archeocerebellum, paleocerebellum, neocerebellum.
- \* **cogito, ergo sum** (latine) : "mi pensas, do mi estas", argumento de la franca filozofa Descartes (Dekart') pri la realeco.
- \* **Ĉan** (ĉine) : ĉina budhismo, influita de la taoismo.
- \* **ego** (latine) : la ego, la memo, la si-sento.
- \* **gnozo** (helene) : **kono (gnozo tradukas la sanskritan -Jñâ-, koni)**.
- \* **hipostazo** (hel.) : fenomeno aŭ persono erarkonsiderata kiel absolutaĵo.
- \* **katharsis** (hel.) : purigado (de la nekonscio).
- \* **ordo rerum** (lat.) : ordo de la fenomenoj (vd. **dĥarmatâ, saMsâra**).
- \* **persona** (lat.) : aktora masko ; rolo ; persono.
- \* **Soto-Zen** (jap.) : antaŭ 800 jaroj fondita skolo de la japana "Zen".
- \* **za-zen** (jap.) : "dhyâna kun sidigô".
- \* **Zen** (jap.) : japana budhismo, influita de la Mahâyâna, de la Ĉan kaj de la taoismo.

\*\*\*\*\*



"Per tiu ĉi verko, la aŭtoro kaj la tradukinto ofertas al la estimataj gelegantoj koncizan, tamen kompletan prezenton de la Budha Instruo. La prezento meritas la epiteton science kaj fake neriproĉebla kaj laŭenhave sufiĉe ampleksa. Eblaj lingvaj deflankiĝoj kompare al la "regula Esperanto" fontas el la fakto, ke aŭtentika filozofia aŭ religia fakvortaro ankoraŭ nehaveblas.

Unu eta rimarko estu permesata:

La Budha instruo estas ne vere ateista, pli ĝuste la Budho ne rifuzis la ekzistadon de estuloj, kiujn oni kutime nomas dioj aŭ diaĵoj ; sed ili estas ankaŭ pasemaj, nedaŭraj, kaj submetataj al Karmo. Sed kion Budho rifuzis, estis la malĝusta opinio de la popolo kaj la asertoj de la pastraro, ke iu plej alta Dipatro aŭ Braĥmo estu la **kreinto** de la mondo aŭ eĉ de la Universo. Kaj li same rifuzis ian ajn elăceton de la "kredantaro" fare de tiuj dioj kaj similaj "savantoj". Tiaj asertoj kaj opinioj estas la Budho nur pruvo de la profunda nesciado pri la veraj naturo kaj karaktero de ĉiuj aĵoj, okazaĵoj kaj fenomenoj.

Kaj ĝuste tiajn kaj similajn erarojn ĉi tiu prezentado povas forigi, kaj demonstri al la gelegantoj la Absolutan Veron."

Hermann Schröder

En la sama serio:

La **Laoco** (Tao-Te-Ĉing aŭ La Libro de Moralo)

**Kial mi estas ateisto** (A. Lorulot)

**La Kvina Evangelio** (Han Riner)

**La Mistero de nia surtera vivo** (Archdeacon)

k.m.a.